

estas kiel "e" en la vorto "bela", kaj "o" en "bona".

Kumi Attobrah donis al la lingvo la nomon Afrihili, kiu kunmetas la vorton Afriko kun la nomo de tre konata afrika lingvo, la svahila (Swahili).

La vorto-provizo estas tute afrika. Li prenis vortojn el multegaj afrikaj lingvoj, ekzemple sana = multe, kaj zuri = bela/bona, el la svahila; papa = bona, y? = esti, fa = preni, el la tvia; ko = ne, kaj kana = unu, el la joruba. Sed li prenis vortojn anka? el multaj aliaj lingvoj, ekzemple el la ha?sa, la kikonga, la zulua, la malagasa. La nombro-vortoj de 1 ?is 10 venas ?iuj el malsamaj afrikaj lingvoj.

Strukture la lingvo estas plene afrika kaj tre malsimila al Esperanto, kiu ja havas originalan gramatikon sed multe similas al e?ropaj lingvoj.

Pronomoj kaj verboj. En kelkaj okcident-afrikaj lingvoj oni ?an?as la fina?ojn ne de la verboj, sed de la pronomoj. La pronomoj estas tre gravaj kaj indikas la personon, la tempon kaj la aspekton de la verbo. La verboj, cetere, konsistas el nur unu silabo, tial estus tre malfacile modifi ilin. Do, la bazaj pronomoj estas tiuj uzataj kun la verboj: mi-, wu-, l?-, ta-, yo-, nu-, ku-, fu-. Se la verbo komenci?as per vokalo, oni faligas la lastan vokalon de la pronomo, tiel: m'-, w'-, l'-, t'-, y'-, n'-, k'-, f'-.



Afrikaj lernejoj lingvoj

Se ni uzus Esperantajn radikojn anstataŭ la veraj afrihilaj vortoj, la sistemo funkcius ĉi tiel: mi ekiras = m'ekas ir; ĉi vidadis = ĉ'adis vid; se li sciis, li ne venus = se l'us sci, l'usne ven.

En la afrihila lingvo ekzistas ankaŭ la liberaj formoj emi = mi kaj ewu = vi, ktp. Tamen tiuj utilas ĉefe por respondi la rektajn demandojn, ekzemple: "Kiu prenis la libron? Mi."

Por la substantivoj Kumi Attobrah sekvis la bantuajn lingvojn. En bantuaj lingvoj ne gravas la finaĵoj kiel en eŭropaj lingvoj, sed la komencaĵoj: Mtoto mkubwa ni mfaransa = (la) granda infano estas franco kaj Watoto wakubwa ni wafaransa = (la) grandaj infanoj estas francoj.

Li pensis, ke substantivo kaj ĉi apuda adjektivo komenciĝu per la sama vokalo, ekzemple: akalini = skribilo, sabo = nova, akalini asabon = nova skribilo; ikalini = skribiloj, ikalini isabon = novaj skribiloj. Se la saman aferon ni farus en Esperanto, la rezulto estus: okulo obela kaj amiko abela.

Afrikaj politikaj aktivuloj kritikis la projekton, kiam ĉi aperis. Ili opiniis, ke krei komunan afrikan lingvon ne estas inter la plej urĝaj problemoj. Ili kredis, ke komuna afrika lingvo ekestos, kiam la afrikaj popoloj estos liberaj komuniki inter si. Ekzemplero de la lernolibro estis prezentita al la prezidanto de la Organizaĵo por Afrika Unueco en Adisabebo en majo 1988. Tio estas la lasta publika informo trovebla pri tiu lingvoprojekto.

Eblas aŭskulti ĉi tiun artikolon, kiun voĉlegis Gabriel Olunmi Osho-Davies ĉe la fonto.

Fonto: uea.facila.org

<https://www.radiohc.cu/eo/especiales/exclusivas/363806-afrihili-afrika-esperanto>



Radio Habana Cuba